

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

Junio/Julio/Aŭgusto 1982



34a IFEF-Kongreso en Hungario 1a ĝis 8a de Majo 1982



foto: Ritterspach

Speciala trajno transportis la 8an de Majo la iom melankoliajn esperantistojn al Budapest

IFEF-Kongreso de bonkoreco en Hungario

20 jaroj pasis de la neforgesebla 14a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) en Budapeŝto. Inter la 2a kaj 8a de Majo 1982 sekvis 605 esperantistaj fervojistoj el 22 landoj denove la afablan inviton de da hungaraj gekolegoj. Balatonfüred, idille situanta ĉe la lago Balaton, estis la gastiganta urbo por la 34a IFEF-kongreso, kie la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) estas reprezentita per 79 membroj.

Agrabla atmosfero

Por komenci per la vetero: la plej multaj kongresanoj forlasis sian hejmon en pluvo kaj malvarmo. Hungario akceptis siajn gastojn en printempa beleco. Plej ofte regis la suno kaj varmece. Alveninte en Budapeŝto la vojaĝantoj sentis sin hejme, kiam la stacidoma laŭtparolilo anoncis la specialan trajnon, kiun la Hungaraj Ŝtatfervojoj (MAV) estis disponigintaj senkoste al la kongresstacio Balatonfüred. La lokomotivo portis sur la fronto la IFEF-emblemo kun aldona teksto. Post kelkhora veturado, parte laŭlonge de la sunbrila Balaton-lago, la staciestra personaro kaj aŭtobusoj atendis en Balatonfüred.

Gastama akcepto

Ŝajnas ke centra konstruaĵo, kie kongresaj salonoj kaj loĝejoj troviĝas sub unu tegmento estas preferata pli kaj pli de la organizantoj. Tiel okazis ankaŭ tiujare. Kongresejo estis la Instrua Centro de la Hungaraj Sindikatoj. La konstruaĵo disponis pri ĉiuj



Nia kongresejo, la Instrua Centro de la Hungaraj Sindikatoj

instalaĵoj por faciligi la kongresan laboron. Trifoje dum la tagoj la kuirejo dorlotis siajn gastojn per bongustaj manĝaĵoj. Bedaŭrinde multaj gekolegoj el socialismaj landoj devis loĝi pro limigita kapacito de la kongresejo aliloke. Eĉ la plej bonaj preparoj ne malhelpas, ke la alvenintoj en la akceptejo ofte devas atendi dum horoj, ĝis kiam ili povas ricevi la menditan ĉambron. La unuafoje praktikita sistemo rapide elliveri la necesajn (ne ĉiujn) kongresdokumentojn, montriĝis tre taŭga. Tiamaniere oni ne estis trostreĉita, kiam la interkona vespero komenciĝis en la subteraj salonoj, precipe en la trinkejo, kie ofte oni konsumis ĉiuspecajn trinkaĵojn.

Tio ĉi okazis dimanĉon la 2an de Majo. Antaŭiris kompreneble kelkaj aliaj aranĝoj, el kiuj estas menciinda la inaŭguro de la ekspozicio en la ne tro malproksima Balatona Galerio. Espereble vizitis ĝin multaj kongresanoj, ĉar ĝi donis trarigardon pri la Esperanto-literaturo kaj Esperanto-poŝtmarkoj. Krome hungaraj gekolegoj eksponis siajn artajn verkojn. Bonega ideo. Ĉiutage funkciis la kongresaj giĉetoj. Precipe allogis la vendado de la specialaj poŝtkartoj. Eble nesufiĉe atendite laboris sukcesplene la radio-amatora stacio en la plej supra etaĝo de la kongresejo. Kiu deziris kompletigi sian librostokon, trovis en la librovendejo sufiĉe da Esperanto-literaturo.

Impona inaŭguro

Lundo, la 3a de Majo, komenciĝis por interesuloj en la loka romkatolika preĝejo per meso, kiun sekvis bone vizitita ekumena diservo. La prediko okupiĝis precipe pri la mondvasta temo „paco“. Akompanis la diservon konvena organmuziko krome komunaj kaj emociaj solkantoj.

Fari el la donita situacio la eble plej bonon ŝajnis esti aparta elemento de la LKK. Kvankam la kapacito de la ĉefa salonego ne sufiĉis por akcepti ĉiujn kongresanojn, tamen la ceteraj povis



Inaŭguro de la ekspozicio en la Balatona Galerio

travivi la malfermon dank' al la telvida tekniko en du apudaj salonoj. Komence staris sur la podio 25 uniformitaj gekolegoj el 17 landoj, alloga celo por film- kaj fotoamatoroj. „Bonvenon“ nomiĝis la deklamita poemo de G. Varga (vidu en la kongreslibro) speciale verkita por tiu kongreso. Junpioniroj en siaj tipaj uniformoj transdonis florbukedojn al la prezidantaro. Harmonian ĉambromuzikon prezentis la Pechan Arĉ-Kvineteo konsistanta el junaj virinoj.

LKK-prezidanto I. Gulyás menciis la grand-skalan subtenon de la ŝtataj kaj fervojaj instancoj, kiuj lastaj estas reprezentitaj per la vicĝeneraldirektoro S. Urbán. Por la protektanto FISAIC (Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj) d-ro E. Semmelrath transdonis, cetere en flua Esperanto, la bondezirojn al la kongreso. Por la Hungara Fervojista Sindikato B. Szemők akcentis la valoron de Esperanto por reciprokaj internaciaj kontaktoj. La salutojn de la gastiganta urbo transdonis I. Rácz, prezidanto de la Urba Konsilio. D-rino F. Szabó laŭdis la efikan laboron de la faka organizaĵo IFEF interne de la

Universala Esperanto-Asocio, dum d-ro I. Pethes, prezidanto de la Mondpaca Esperanto-Movado, substrekis la valoron de la porpacaj klopodoj. La necesajn parolojn modele tradukis kaj laŭtleĝis d-ro F. Jáki.

Sekvis solena momento, kiam d-ro E. Semmelroth flanke de FISAIC honorigis la multjaran poresperantan agadon de d-ro I. Bácskay per distingo de la ora medalo. La kortuŝita prezidanto de la hungaraj fervojistaj esperantistoj sincere dankis.

La delegitoj de la landaj asocioj transdonis siajn salutojn kaj bondezirojn Por GEFA alparolis W. Grass, la redaktoro de la BULTENO.

Per sia konata voĉo de Jong, la iama IFEF-prezidanto, rememoris pri la antaŭa bone sukcesinta 14a IFEF-kongreso en Budapeŝto. Tiurilate estis agrabla revido post 20 jaroj. Post la poemo „La Vojo“ de Zamenhof, sugeste deklamita de Z. Selyei, la IFEF-prezidanto J. Giessner citis de J. Kádár, unua sekretario de la Hungara Socialista Laborista Partio, pozitivajn

frazojn pri la noblaj celoj de Esperanto, akcentis siavice la porpacan agadon ankaŭ de la esperantistaj fervojistoj kaj deklaris la kongreson malfermita. Pionira koruso el Balatonfüred kantis hungarajn popolkantojn, antaŭ ol la Esperanto-himno fermis la inaŭguron.

En sekva gazetarkonferenco reprezentantoj de televido kaj fakaj gazetoj estas vaste informitaj pri IFEF kaj la ĝenerala signifo de la Esperanto-movado. Ekstere disvolviĝis la komuna fotografado, dum kiu la uniformitaj gekolegoj denove altiris la atenton.

Organizaj aferoj sen grandaj problemoj

Unu nepublika laborkunsido kaj du publika plenkunsidoj kun sufiĉe da partoprenantoj traktis 18 tagordajn punktojn, pri kiuj „Internacia Fervojisto“ aparte raportas. La komitato elektis la novan estraron.

Prezidanto Giessner kaj vicprezidanto P. Engen restas en siaj postenoj. Pro demisio de la ĝisnuna redaktoro G. Delaquaize / Francio la germana kolego O. Rösemann eniris li IFEF-estraron kiel nova sekretario. H. Olsen / Danlando, antaŭe sekretario, fariĝis redaktoro. Reelektiĝis kiel ekonomisto H. Hauge / Danlando. Vicprezidanto P. Engen / Norvegio donis resumon pri la agado en 1981 surbaze de la landaj raportoj. Estas traktitaj — por citi nur kelkajn temojn — la laborplano, la situacio en diversaj landoj, la raporto de komisionoj kaj komisiitoj, la rilatoj al aliaj organizaĵoj ktp. Detalojn vidu en „Internacia Fervojisto“. Ne mankis invitoj por la venontjaraj kongresoj. Do la 35a IFEF-kongreso okazos en Oostende / Belgio de la 4a ĝis la 10a de Junio 1983, kaj la invito por la 36a IFEF-kongreso venis flanke de la bulgara landa asocio al la „ora strando“, 23 km for de Burgas.

Elstara faka laboro

La faka laboro de la esperantistaj fervojistoj prenis dum la lastaj jaroj gravan kaj pli kaj pli agnoskitan pozicion en la Esperanto-movado. La nur unufoja kunsido de la fakterminaj specialistoj jam delonge ne plu sufiĉas, post kiam la traduko de la fakleksikono de la Unio Internacia de la Fervojoj (UIC) estas komencita. Kvankam la traduko de la 10 000 fakterminoj estas finita, la revizio ankoraŭ postulos multe da tempo. En simila senso

laboris la fakprelega komisiono, kies tasko estas i. a. certigi kaj ekspluati lingve senriproĉan fakprelegon dum kongresoj de IFEF aŭ UEA. Bedaŭrinde la temo „Aktualaĵoj el via lando“ ne aperis en la programo, manko evitenda estonte. Tamen multaj kongresanoj plenigis la salonegon, kiam LKK-prezidanto I. Gulyás komencis sian altnivelan fakprelegon pri „La estonto de la eŭropaj fervojoj kaj la rolo de la Hungaraj Statfervojoj“. La resumo troviĝas sur alia loko de la BULTENO. Kompletigis la prelegon projekciado de diapozitivoj el du projektoroj kun bedaŭrinde tro laŭta muziko.

Riĉa kultura programo

LKK multe klopodis por oferti al siaj gastoj ne nur laboron, sed ankaŭ kulturajn aranĝojn. Unuavice estu menciata la ampleksa kongreslibro kun pli ol 100 paĝoj, kiu modele trapasis la kadron de pure informa broŝuro. La vera valoro evidentiĝis nur postere. Plaĉis ankaŭ la arĝentmetala kongresinsigno kun la konturoj de la Balaton-lago.

Plenplena estis la salonego okaze de la kulturvespero. La unua parto estas dediĉita al serena muziko, kiun lerte prezentis la Simfonia Orkestro de la Hungaraj Statfervojoj sub la dirigento G. Oberfrank. La reperturaro ampleksis verkojn de F. Erkel, Z. Kodály, F. Liszt kaj Berlioz. Dum la muzikaĵoj la elstara aktorino K. Berec prezentis per belsona voĉo esperantlingvajn poemojn. Ŝia partnero J. Kovács, same profesia aktoro, legis el la „Unuminutaj noveloj“ de I. Örkény. La aŭskultantoj ne ŝparis aplaŭdon post tiu elstara koncerto.

Tute alian karakteron havis la dua parto de la vespero. Cigana orkestro prezentis senlace sian tipajn muzikaĵojn. Folkloraj dancistoj, foje pure viraj, foje miksitaj regis kun verve kaj temperamento la scenejon. Du virinoj furiozigis la aŭskultantojn per siaj fajraj kantoj, kaj grupo de junulinoj ritme dancantis. Tamen stariĝas la demando, ĉu la kombino de simfonia muziko kun folkloro kaj solkantoj ne estis troa por unu vespero.

„Arkeologiaj demandoj de Balaton kaj ties regiono“ estis la temo de altkvalita prelego farita de B. Golden, specialisto pri tiu fako. Alian altnivelan prelegon pri „Balatonfüred kaj la literaturo“ prezentis elokvente d-ro F. Jáki. „Pri aplikado de Esperanto en natursciencoj“ referis d-ro O. Haszpra.

Kiel lastjare en Regensburg okazis lingva studkurso sub la lerta gvidado de Eva Farkas Tatár krome lingva ekzameno, kiun trapasis sukcesplene ekzamenitoj el kvar landoj. Menciinda estas ankaŭ la akcepto de la IFEF-estraro, de la LKK kaj de la delegitoj en la urba konsilia domo, kies prezidanto detale konatigis la historion de Balatonfüred. Oni interŝanĝis donacojn kaj ĝuis la harmonian regalon.

Ekskursoj per ŝipo kaj aŭtobusoj

La hungaroj tre fieras pri sia Balaton-lago. Ne mirinde ke la unua ekskurso kondukis per ŝipo al la mezo de la lago. Kiam la taga heleco ĉesis al la nokto, ekbrilis miloj da lumoj óe la bordoj. Bonega etoso regis, muziko stimulis al dancado. Estis agrable fino post la unua streĉa kongrestago.

La 4an de Majo startis kvar aŭtobusoj al proksima duoninsulo Tihany, sur kies pinto estas videbla jam de malproksime iama monaĥejo kun barokstila dutura preĝejo. De la monto la lago respegulis la bluan ĉielon. La preĝejo, kiu en la kriptoj cetere entenas la tombon de la fondinta reĝo Andreas depest preskaŭ mil jaroj, servis al plua kultura ĝuo. Dum unu horo eksonis majstre prezentita orgenmuziko kaj emociaj solkantoj. La tuta duoninsulo forte impresis per sia harmonio subtenita per somera vetero.

Aliaj kvar aŭtobusoj transportis samtage ekskursantojn al la urboj Veszprém kaj Herend. En tiu regiono, kiu bone povis konservi sian mezepokan stilon, vivis hungaraj reĝoj. En Herend la porcelan-



Ekskurso al Tihany

fabrika surprizis la vizitantojn per mirinde pentritaj porcelanaĵoj.

Kulmino de la turista programo estis la tuttaga ekskurso. Kiam la 6an de Majo naŭ aŭtobusoj forlasis la kongresejon, akompanis ilin unue pluvo. Bonŝance ĝi ĉesis al la brilo suno.

Antaŭ la pordo de la pionir-urbo Zánka situanta sur vasta arealo, akceptis la gvidantoj kaj ĉarmaj pioniroj (ĝis 14 jaroj) la kongresanojn.

La IFEF-prezidanto donacis rubandon, la LKK-prezidanto Esperanto-flagon, antaŭ ol komenciĝis la vizito al la muzeo, kiu ilustris per multnombraj objektoj la historian evoluon de tiu junularo. Ne mankis ankaŭ eksponaĵoj el aliaj landoj. Precipe interesa estis ekspozicio de infanaj pentraĵoj el la tuta mondo, sen nia lando. Laŭdire la geknaboj rajtas resti tie nur limigitan tempon. La sekva celo estis la urbo Keszthely, pli precize la tiea kastelo, kiu povis esti vizitata malgraŭ la renovigaj laboroj. La ampleksa biblioteko entenis ankaŭ multnombrajn librojn en germana lingvo. Ŝajnas ke la iamaj posedintoj ankoraŭ havas limigitan loĝrajton en la kastelo.

Intertempe la suno estis tiel forta, ke post la alveno en la fama banloko Hévíz la soifo postulis trinkaĵojn aŭ glaciaĵon en unu el la budoj apud la busstacio. Kvankam la varmakva lageto altiris multnombrajn vizitantojn, la kongresanoj bedaŭrinde ne povis sinbani, ĉar ilin atendis abunda, rapide servita tagmanĝo. La ekskurso finiĝis en restoracio ĉe la monto Badacsony, kie ciganmuziko kaj diversspecaj vinoj kreis gajan harmonion.



Kastelo Keszthely

Adiaŭo

Tiu raporto priskribas nur koncize la eventojn dum la kongreso. Kiu mem partoprenis, rememoras certe pri aliaj agrablaj programoj. Ne tro bonan impreson postlasis la internacia balo pro la limigitaj lokoj kaj la malpermeso konsumi trinkaĵojn en la salonego. Ankaŭ la lasta vespero kun denova ziganmuziko ne estis laŭ ĉies gusto. Dum la paŭzo sonfilmo pri la lastjara kongreso en Regensburg de W. Barnickel ankoraŭfoje vekis memorojn, dum LKK-prezidanto de Sutter varbis por la venontjara IFEF-kongreso en Oostende/Belgio. Tre laŭdinde kaj helpema estis la trifoja eldono de kongresa bulteno, kiel entute LKK kun siaj helpantoj ĉe la giĉetoj kaj malantaŭ la kulisoj meritas la sinceran dankon pro la sukcesplena kongreso de bonkoreco, kiel nomis ĝin IFEF-prezidanto Giessner dum sia ferma alparolo. Denove speciala trajno transportis la 8an de Majo la iom melankoliajn esperantistojn al Budapeŝt, kie por 200 personoj komenciĝis aparta, alloga vizitprogramo. W. B.



Plantado de memor-arbo
apud la kongresejo

ĉiuj bildoj: Grass

La Postkongreso en Budapeŝt

Granda parto de la 34a IFEF-kongresanoj partoprenis ankaŭ la Postkongreson en Budapeŝt, okazintan je la 8a kaj 9a de Majo 1982. Por multaj estis certe ĝojiga revido kun Budapeŝt, la perlo ĉe la

Danubo, por la aliaj granda travivaĵo konatiĝi kun ĝi. Riĉenhava estis la programo. Tri aŭtobusoj atendis nin ĉe la stavidomo Keleti pu post nia alveno per speciala trajno. Je la sama tago ni vizitis la Nacian Muzeon kun la ekspozicio de la t. n. „ŝtataj juveloj“. Vespere ni estis en tipa hungara restaŭracio, kie ni manĝis kaj trinkis hungarece kun ciganzmuziko. Poste ni faris noktan aŭtobusveturadon tra la urbo.

Je la venonta antaŭtagmezo ni vizitis la tombon de la fama hungara Esperantisto Julio Baghy (1891 – 1967), elstara populara verkisto kaj poeto.



Sur la tombon metis la IFEF-prezidanto s-ro Giessner florbukedon. Bedaŭrinde pluvigis dum ĉi-tiu ceremonio. Sed dum vizito de la trafikmuzeo la pluvo jam ĉesis kaj, kiam ni staris sur la placo de la herooj, la suno denove brilis. Posttagmeze ni unue ĝuis la veturadon per la Pioniroferovo tra la bela montara ĉirkaŭaĵo. Tamen la kronado de nia restado en Budapeŝt estis la vizito de la Fiŝista Bastiono kaj Matiaso-preĝejo. Belan rigardon ni havis de supre sur la Danubo kaj la Parlamentoĵo. Preskaŭ ĉiu domo en ĉi-tiu urboparto staras sub monumenta protekto. Kelkaj de ni ne povis preterlasi la okazon, viziti la unikan sukerujon Ruszwurm el la jaro 1698.

Vespere ni denove unuiĝis en la socialturista hotelo meze en la urbo por lastfoje manĝi tie. Elkore ni dankas la hungarajn Esperantistojn, ke ili montris dum vere nur unu tago kaj duono tiom da vidindaĵoj de ilia bela ĉefurbo.

J. S.

Eisenbahner-Esperanto-Kongreß in Ungarn

Unter der Schirmherrschaft des Internationalen Verbandes der kulturpflegenden Eisenbahner (FISAIC) fand vom 2. bis 8. Mai 1982 der 34. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF) in Ungarn statt. Gastgebernde Stadt war der Badeort Balatonfüred am Plattensee. Die „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk“ (GEFA) war unter den mehr als 600 Teilnehmern aus 22 Ländern mit einer stattlichen Gruppe vertreten.

Unter den zahlreichen Ehrengästen, die der feierlichen Eröffnung beiwohnten, befand sich der stellvertretende Generaldirektor der Ungarischen Staatsbahnen sowie als Vertreter der FISAIC Dr. E. Semmelrath, Präsident der Bundesbahndirektion Wien, der bei dieser Gelegenheit Dr. I. Bacskai, den Vorsitzenden der ungarischen Eisenbahner-Esperantisten für seine vielfältigen Verdienste mit der goldenen FISAIC-Medaille auszeichnete. Uniformierte Eisenbahner aus 17 Ländern gaben der Veranstaltung – wie beim letztjährigen Kongreß in Regensburg – ein buntes Bild.

Der fachlichen Weiterbildung dienen

Vorträge über Neuerungen bei den verschiedenen Bahnen und über die künftige Verkehrsentwicklung in Europa. Die Übersetzungsarbeiten am UIC-Fachwörterlexikon sind zu einem gewissen Abschluß gekommen. Dias unterstützten Vorträge über den geschichtlichen und geistigen Lebensraum um den Plattensee. Weitere Anziehungspunkte waren Esperanto-Sprachkurse mit Prüfungen, eine Funkstation der Eisenbahner-Radio-Amateure, der Sonderstempel am Postschalter, eine Ausstellung, ein Bücherstand.

Den in einem gewerkschaftseigenen Hotel komfortabel untergebrachten Teilnehmern wurde ferner ein Symphonie- und Orgelkonzert geboten, ein echt ungarischer Folkloreabend mit Zigeunermusik, ein Ball sowie mehrere Ausflüge mit Schiff und Bus zu reizvollen Orten am Plattensee. Und wer sein Bild über Ungarn noch vervollständigen wollte, fuhr mit dem kostenlosen Sonderzug nach Budapest zu einem anschließenden Zweitagesaufenthalt.

Es waren ereignisreiche, gelungene Kongreßtage, für deren Gestaltung den ungarischen Kollegen herzlich zu danken ist. W.B.

24a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno en Germanio 22. – 29. 1. 1983

GEFA organizos la 24an IFES 1983 sub gvidado de la distriktkomisiito Vitus Röder en Bayrisch Eisenstein kaj invitas al partopreno.

Bayrisch Eisenstein estas konata vintro-sportloko en la Bavara Arbaro proksime de la landlimo inter FR. Germanio kaj ĈSSR. Ĝi havas fervojan stacion. Trajnŝanĝo necesas en Plattling.

La hotelo „Waldspitz“ estas atingebla piede de la stacidomo en 10 minutoj.

80 litoj estas je nia dispono. La hotelo disponas pri propra varmbanejo. La uzado estas enkalkulita en la prezo.

La partoprenantojn atendas bela regiono kun taŭga skitereno por ĉiuj kategorioj. Ski- kaj Esperantokursoj estas planataj.

Limdato por la aliĝilo estas la 31. 12. 1982. Pro la limigita loko baldaŭa aliĝo estas rekomendinda. Neesperantistojn ne eblas akcepti.

Aliĝilo havebla ĉe la sekretario

Elfriede Kruse, Wiener Straße 121,
D-6000 Frankfurt/Main 70

34a Kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio en Balatonfüred, Hungario, Majo 1982.

Prelego de Istvan Gulyás:

La Estonto de la Eŭropaj Fervojoj kaj la rolo de la Hungaraj Ŝtatafervojoj (MAV)

(Resumo)

En antaŭvidebla estonto la fervojo precipe en Eŭropo ne estas malhavebla, la trafikpolitiko celas al internacia kunlaborado por certigi konkurenckapablon. UIC eldonis 1973 „Kernretan Planon de la eŭropaj fervojoj“, en kiu oni proponas unuecajn normojn de la evoluo. Sekvis „Infrastrukturplano“ kaj studaĵo „La estonto de la eŭropaj fervojoj“. Por la pasaĝertrafiko elstaras kvar postuloj: rapidaj motortrajnoj inter la eŭropaj metropoloj, bone funkcia laborantartrafiko (220–240 km), taŭga oferto por feriovojaĝoj, ankaŭ por kunporti propran aŭtomobilon, kaj noktaj interligoj per litkaj kuŝvagonoj (800 – 1200 km). Ĉe la vartransporto gravas plirapidigo kaj pli-perfektigo de kombinitaj transportmetodoj.

Multsignifa faktoro estas, ke la fervojo foruzas kompare malpli da energio ol aliaj trafikbranĉoj kaj sur la kampo de medioprotektado ĝi havas avantaĝojn eĉ el du vidpunktoj: elektra trakcio ne malpurigas la aeron, kaj trajnoj kaŭzas malpli da bruo ol kamionoj aŭ aŭtobusoj. Ankaŭ komparante la bezonon je laborforto po tuno de transportplenumo la fervojo montriĝas pli ekonomia. Ĉe grandurboj kaj urbokunaĵoj nur fervojo povas plenumi la amasajn homtransportojn. Krome la sistemo rado sur relo havas ankoraŭ potencajn rapidec-rezervon.

La rekomendoj de UIC havas ĝeneralan karakteron. Ĉe novkonstruado de linio oni nepre priatentu la permeseblan atmosferpremiŝanĝon en la vagonoj kaj la bruo-

34. Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperantioverbandes (IFEF) in Balatonfüred, Ungarn, Mai 1982.

Vortrag von Istvan Gulyás:

Die Zukunft der europäischen Eisenbahnen und die Rolle der Ungarischen Staatsbahnen (MAV)

(Resümee)

In absehbarer Zukunft ist die Eisenbahn, vor allem in Europa, unverzichtbar; die Verkehrspolitik zielt auf internationale Zusammenarbeit hin, um die Wettbewerbsfähigkeit zu gewährleisten. UIC hat 1973 einen Leitlinienplan der europäischen Eisenbahnen aufgestellt, in dem einheitliche Parameter für die Entwicklung vorgegeben werden. Es folgte ein Infrastrukturplan sowie die Studie „Die Zukunft der europäischen Eisenbahnen“. Vier Grundforderungen beziehen sich darin auf den Personenverkehr: Schnelle Triebzüge zwischen Europas Hauptstädten, gut funktionierender Berufsverkehr (220 – 240 km), nachfragegerechtes Angebot für Ferienreisen, auch zur Mitnahme des eigenen Pkw, Nachtreiseverbindungen mit Liege- und Schlafwagen (800 – 1200 km). Für den Güterverkehr zählt vor allem die Erhöhung der Geschwindigkeiten, die Weiterentwicklung kombinierter Beförderungsarten.

Ein besonders schwerwiegender Faktor: die Eisenbahn verbraucht vergleichsweise weniger Energie als andere Verkehrsträger, und auf dem Sektor Umweltschutz hat sie gleich zweierlei Vorzüge: die elektrische Zugbeförderung verursacht keine Luftverschmutzung und Züge machen weniger Lärm als Lastkraftwagen oder Busse. Auch beim Vergleich des Arbeitskräftebedarfs je beförderter Tonne erweist sich die Bahn als wirtschaftlicher. In Großstädten und Ballungsräumen kann nur die Bahn den massierten Personennahverkehr bewältigen. Und schließlich birgt das System Rad-Schiene noch beträchtliche Geschwindigkeitsreserven in sich.

Die Empfehlungen der UIC haben allgemeinen Charakter. Beim Bau neuer Strecken sollen unbedingt auch die zulässige Luftdruckschwankung in den Fahrzeugen und

efikon. La atingeblaj rapideco kaj vojaĝ-
daŭro devas orientiĝi je la aviadila
konkurenco, nur por dumnoktaj trajnoj tio
ne gravas. Antaŭ modernigaj laboroj oni
studu la prioritaton el ĉiuj vidpunktoj.

UIC iniciatis grandan nombron da akso-
studoj kaj en tiuj taskoj ankaŭ partoprenas
la Hungaraj Statfervojoj. MAV gvidis la
aksostudon „Adriatiko“ kaj partoprenis en
tri aliaj studoj: „Balkano“, „Danubo“ kaj
„Baltiko“. Pro la ŝlosila pozicio de
Hungario en la eŭropa kernreto la
modernigaj aktivecoj tie estas tre gravaj.
Necesas kreskigi la kapaciton de
ekzistantaj linioj, elkonstrui unutrakajn
liniojn al dutrakaj kaj eĉ novkonstrui
kelkajn liniosekciojn. La elektrizado estos
daŭrigata, sekurecajn kaj telekomunikajn
instalaĵojn oni modernigos per elektroni-
kaĵoj, teleregado de signaliloj kaj
ambaŭsenca trakuzo plialtigos la linio-
kapacitojn. Ĝis la jaro 2000 MAV povos
kontentigi ĉiujn postulojn de la internacia
trafiko sur la eŭropa kernreto.

die Geräuscentwicklung berücksichtigt
werden. Die erreichbare Geschwindigkeit
und die Reisedauer müssen sich an der
Flugkonkurrenz orientieren; für Nacht-
verbindungen spielt dies keine so große
Rolle. Vor Modernisierungsarbeiten sollte
deren Priorität unter allen Gesichtspunkten
geprüft werden.

Die UIC hat eine Vielzahl von Achsen-
studien angeregt, und auch die Ungarischen
Staatsbahnen beteiligten sich an diesen
Aufgaben. So entstand unter Leitung der
MAV die Achsenstudie „Adria“, und die MAV
beteiligte sich an drei weiteren Studien:
Balkan, Donau und Baltikum. Wegen der
geographischen Schlüsselstellung Ungarns
im europäischen Leitplanstreckennetz
kommt den hiesigen Aktivitäten zur Moder-
nisierung besondere Bedeutung zu. Die
Leistungsfähigkeit der bestehenden Linien
muß erhöht werden, eingleisige Strecken
müssen zweigleisig ausgebaut werden,
einzelne Streckenabschnitte werden sogar
neu gebaut werden müssen. Die Elektrifi-
zierung wird weiter vorangetrieben, Sieche-
rungs- und Fernmeldeanlagen werden mit
moderner Elektronik ausgestattet, Fern-
steuerung und Gleiswechselbetrieb erhöhen
die Leistungsfähigkeit der Strecken. Bis
zum Jahr 2000 werden die MAV in der
Lage sein, alle Forderungen des internatio-
nalen Verkehrs auf dem europäischen
Leitplanstreckennetz erfüllen zu können.

Rezolucio

La 34a Kongreso de Internacia Fervojista
Esperanto-Federacio (IFEFF) okazinta en
Balatonfüred, Hungario,
kun 605 partoprenantoj el 22 landoj

konstatas,

ke grave akriĝas la lingvaj komplikajoj
en ĉiaspecaj internaciaj institucioj,
kunvenoj kaj konferencoj, ĉefe pro
daŭra aldono de novaj konferenc-
lingvoj.

substrekas,

ke bedaŭrinde ankaŭ la fervojaj entre-
prenoj, fervojistaj sindikatoj kaj aliaj
fervojistaj organizoj same agas, apli-

Resolution

Der 34. Kongreß des Internationalen
Eisenbahner-Esperantoverbandes (IFEFF),
der in Balatonfüred mit 605 Teilnehmern
aus 22 Ländern stattfand,

stellt fest,

daß sich die sprachlichen Probleme in
internationalen Gremien aller Art vor
allem durch die Zulassung von immer
mehr Konferenzsprachen ständig
zuspitzen;

unterstreicht,

daß leider auch für Eisenbahnen,
Eisenbahner-Gewerkschaften und
andere Vereinigungen der Eisenbahner

kante privilegiitajn lingvojn de potencaj ŝtatoj, tiel subpremante ĉiujn aliajn lingvojn kaj neglektante evidentajn malavantaĝojn, kiel ekzemple superfluajn kostojn, tempoperdojn, tradukerarojn, miskomprenojn,

emfazas,

ke tiuj kutimoj endanĝerigas la pacan kunvivadon de la popoloj, malhelpas ties komprenon unuj por la aliaj kaj kontraŭas la Finakton de Helsinki,

atentigas,

ke la Ĝenerala Asemblo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 „Internacia Jaro de Komunikado“ kaj sekve

invitas

la fervojojn kaj fervojistajn sindikatojn, sed precipe la Internacian Federacion de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC), utiligi al sia la eminentajn ekonomiajn kaj sociajn avantaĝojn de la neŭtrala kaj bone funkcia internacia lingvo Esperanto ĉiel aplikebla,

deklaras,

ke la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio pretas ĉiu-rilate helpi, por ke la proponitaj celoj kiel eble plej rapide kaj komplete estu atingataj.

Balatonfüred, 7a de Majo 1982

por la Federacio
G i e s s n e r
prezidanto

Adreso:

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Sekretario: Otto Rösemann
Ringstraße 14
D-3067 Lindhorst

das gleiche gilt, nämlich daß sie die privilegierten Sprachen der großen Staaten bevorzugen und so alle übrigen Sprachen unterdrücken, wobei sie offensichtliche Nachteile wie unnötige Kosten, Zeitverlust, Übersetzungsfehler und Mißverständnisse außer acht lassen;

betont,

daß diese Gepflogenheiten das friedliche Zusammenleben der Völker beeinträchtigen, das gegenseitige Verstehen erschweren und in Widerspruch zu der Schlußakte von Helsinki stehen;

weist darauf hin,

daß die Vollversammlung der Vereinten Nationen das Jahr 1983 zum „Jahr der internationalen Verständigung,“ erklärt hat;

appelliert

an Eisenbahnen, Eisenbahner-Gewerkschaften und insbesondere an FISAIC, die internationale Vereinigung kulturpflegender Eisenbahner, sich der wirtschaftlichen und sozialen Vorteile der neutralen, perfekt funktionierenden, internationalen Sprache Esperanto zu bedienen, die auf allen Gebieten anwendbar ist;

erklärt

die ausdrückliche Bereitschaft des Internationalen Eisenbahner-Esperantoverbandes zu jeder möglichen Unterstützung, damit die angestrebten Ziele so schnell und vollständig wie möglich erreicht werden können.

Balatonfüred, 7. Mai 1982

Für den Verband
G i e ß n e r
Vorsitzender

Anschrift:

Sekretariat des Internationalen
Eisenbahner-Esperantoverbandes
Otto Rösemann,
Ringstraße 14, D-3067 Lindhorst

Mitteilung des Vorstandes

Die Sitzung des Beauftragten für Esperanto im BSW mit dem Arbeitsaus-schuß und den Bezirksbeauftragten am 27. 3. 1982 in Würzburg hat sich u. a. eingehend mit „Werbung und Information“ befaßt. Das Thema soll bei der 26. JV in Friedberg fortgesetzt werden. Der Beauftragte für Esperanto hat s. Zt. vorgeschlagen, sich bis Ende Juli 1982 mit der Thematik zu beschäftigen und brauchbare Vorschläge für eine erfolgreiche Werbung neuer Mitglieder zu diesem Zeitpunkt an ihn zu senden. An den bevorstehenden Termin wird erinnert.

Seniorentreffen

Für das diesjährige Treffen der Senioren ist die Wahl auf Würzburg gefallen. Es soll am Samstag, dem 4. September in den Hauptbahnhofsgaststätten stattfinden. Alle Mitglieder dieser Gruppe, die gleichzeitig Mitglieder im BSW sind und Würzburg günstig erreichen können, werden rechtzeitig zur Teilnahme eingeladen. Bitte, notieren Sie sich schon jetzt diesen Termin.

E. Kruse

26. Jahresversammlung vom 15. — 17. 10. 1982 in Friedberg

Die Anmeldevordrucke sind mit Bulteno 2 verteilt worden. Nachforderungen bei den Bba möglich. An die Rücksendung bis 31. 8. 1982 wird erinnert. Zeitige Rücksendung ermöglicht Zimmerreservierung in der Nähe der Stadthalle, am Seebach 2 in Friedberg. Es bestehen keine öffentlichen Verkehrsverbindungen zur Stadthalle. Ein Taxistand befindet sich am Bahnhof. Der Fußweg beträgt ca. 20 Minuten. Der Weg zur Stadthalle ist gut beschildert.

Sprachprüfung

Interessenten werden gebeten, sich umgehend mit dem Beauftragten Fritz Lautenbach — Anschrift s. „Berichtungen“ Seite 12 in Verbindung zu setzen.

Korespondado kaj ŝanĝo de poŝtmarkoj deziras: Elio Mazzacane, Via Isarco 7, I-58100 Grosseto. Pluajn informojn donas E. Herlitze, BD Köln, Büro B (Ozl).

Redaktfino por n-ro 4/82 estas la 10an de Aŭgusto 1982

Nekrologo

Ni perdis nian membron

**Fritz Lipka,
BOAR a. D., Bielefeld**

Li mortis la 10. 4. 1982 en la aĝo de sepdektri jaroj. Li partoprenis regionajn kunvenojn kaj jarkunvenojn. En la lastaj jaroj pro apopleksio li ne povis forlasi la loĝejon.

Sincere ni esprimas nian kodolencan al la filo.

GEFA-estraro

El la distriktoj kaj grupoj

Frankfurt/Main

Guten Kontakt zur Presse im Großraum Frankfurt pflegt die Gruppe. Positive Berichte brachten die „Frankfurter Rundschau“ (15. 4.), die „Allgemeine Mainzer Zeitung“ (19. 4.), die „Hofheimer Zeitung“ (3. 4.) und das „Höchster Kreisblatt“ (6. 4. 1982), letztere mit einer Leserschrift von H. Nischwitz, Bensheim. Die meisten Berichte gehen auf die Initiative unserer Mitglieder zurück.

Je 1 Interview mit Elfriede Kruse und Gernot Ritterspach, beide mit Bild, können als sehr werbewirksam für die Internationale Sprache herausgestellt werden.

Offenbach:

La 14an de Majo malfermis la Klingspor-Muzeo en Offenbach en ĉeesto de fakuloj ekspozicion pri kaligrafaĵoj. Greta Deutsch, membro de nia grupo, brilis inter la eksponentoj kun interesa, moderna Esperanto-afiŝo, kiu trovis vastan atendon.

Inter la unuaj spektantoj troviĝis niaj francaj geamikoj Janine kaj Jaques Gross el Le Mans, kiuj reveninte de la kongreso en Balatonfüred vizitis nin.

Al Greta Deutsch ni kore gratulas pro ŝia sukceso. Ni certas, ke la afiŝo trovos agnoskon ankaŭ inter la Esperantistoj.

Hannover/Bremen

La membroj kunvenis en Aprilo sub la devizo „jen petole — jen serioze; ludoj / skeĉoj / diskutoj“. Jam en Februaro okazis la jarkunveno kun daŭrigo en Marto. La nove elektita estraro etabliĝis kaj komencis sian laboron. Nia amiko Dieter Hartig rezignis pri la ofico de klubestro. La 16an de Majo okazis la maja ekskurso al Ahausen (Rotenburg).

Nürnberg/Lichtenfels

12 Personoj de la Grupo haben am 34. IFEF-Kongreß in Ungarn teilgenommen. Im Vergleich zu bedeutend größeren Städten dürfte es sich um eine Spitzenbeteiligung handeln. Unserem „Motor“ und Reiseleiter Hans Müller sagen wir ein herzliches Dankeschön.

Wir begrüßen unsere neuen Mitglieder aus dem Bezirk Nürnberg:

Hermann Feulner,
8620 Lichtenfels, Mohnweg 1
Gabriela Eichenseer,
8500 Nürnberg, Siegeldorfer Straße 54
Renate Pohl,
8800 Ansbach, Jüdtstraße 60/8
Doris Rathmann,
8500 Nürnberg, Altenberger Straße 21
Egon Roderer,
8400 Regensburg, Wittelsbacherstr. 5 a

Ĉiuj novaj membroj lernis Esperanton ĉe la Socialorganizo de la Germana Federacia Fervojo.

Wir empfehlen unseren neuen Mitgliedern zur Weiterbildung den Eisenbahner-Esperantisten-Briefwechsel (F.K.S.).

Der „Fervoja Koresponda Servo“ vermittelt auf Wunsch Anschriften von Esperantisten, die mit Sprachfreunden des In- und Auslandes in Briefwechsel treten wollen. Diesen Dienst können alle GEFA-Mitglieder — Eisenbahner, Angehörige und Freunde unserer Organisation — kostenlos in Anspruch nehmen.

Schreiben Sie — selbstverständlich in Esperanto — an:

S-ro J. Demissy, 18 avenue du Lieutenant Bourgungnon, F-55600 Montmedy.

Wenn Sie sich informieren wollen oder Anschriften wünschen, fügen Sie bitte einen Internationalen Rückantwortschein bei.

Geben Sie Ihre Anschrift an, Ihr Alter und Ihre Wünsche mit welchen Ländern und über welche Themen Sie korrespondieren wollen.

Berichtigung:

des Anschriftenverzeichnisses 1982, Bulteno 1/82, Seite 8:
BAR Lautenbach, Bf 6400 Fulda;
Basa 957/822/120 aŭ 955/822/120.
Privata adreso kaj poŝttelefonnumero:
Abtstor 21, D-6400 Fulda, (06 61) 7 76 27.

Niaj kongresoj Kristanoj en Nederlando.

La 32-a Internacia Kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) havos lokon en la konferencejo „De Burght“, Burgh-Haamstede (Nederlando), de la 17-a ĝis la 24-a de Julio 1982.
Inf.: E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a. d. Rijn.

Instruistoj en Italio.

La 16-a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazos de la 15-a ĝis la 24-a de Julio 1982, en Seiano di Vico Equense, proksime al Napolo. Inf.: R. Incoronato Pia, via Panoramica 63, I-80056 Ercolano.

NORVEGA JUBILEO. Klubo Esperantista en Oslo la 1-an de Decembro 1981 celebris 75-jaran jubileon. Dum la festkunveno, en kiu partoprenis preskaŭ 50 personoj, lektoro Odd Tangerud preligis pri esperanta literaturo, kaj G. Stöp-Bowitz skizis la historion de la klubo.

TRICENT BRAZILANOJ. En urbo Salvadoro (Brazilo), 19 ĝeinstruistoj gvidas Esperantokursojn por 303 ĝelernantoj.

Kamboĝo: Linio denove malfermita

La linio de Phnom-Penh al Battambang, kiun oni ĉesis uzi antaŭ pli ol unu jaro, denove estas funkciigata. Tiucele antaŭe estis riparendaj 19 pontoj, 139 km da trak-instalaĵoj, dudek lokomotivoj kaj 265 pasaĝervagonoj.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz